# EKO 2025

**Bleko kun eĥo**

EKO 2025-20. Majo 14. Pezo: Word 40, PDF ~~260~~ KB, Alkroĉaĵo UN: Sume 300 KB

## Duncan Charters pri la Papo Francisko

Mi dankas kaj gratulas vin (Humphrey Tonkin) pro la diskonigo de la trafa mesaĝo pri la forpaso de Papo Francisko.  Ankaŭ al kolegoj kiuj per siaj vortoj reliefigis en retlistoj lian ekzemplon egale por katolikoj kaj ne-katolikoj.

La surpriza elekto de la unua usona papo naskiĝinta en Ĉikago, Robert Francis Prevost, kiel Papo Leo (Leono) XIV (14-a) estas ankaŭ kuraĝiga paŝo, ŝajne ebligita de lia konatiĝo kun la pli novaj kardinaloj de plej diversaj landoj nomumitaj de Papo Francisko.  Liaj ducivitaneco (Usono kaj Peruo) kaj monda perspektivo, lia dekomenca insisto pri mesaĝo de paco kaj unueco kaj neakcepto de kontraŭhoma agado, aŭguras daŭrigon de la plej altaj aspiroj de lia antaŭulo.  Aparte signifa por ni estas, ke kiel denaska parolanto de la angla lingvo, li elektis ne uzi ĝin en la unua publika apero, sed alparolis la publikon en la tradicia latina, la itala kaj la hispana, kiujn li alproprigis al si kaj per kiuj li nature komunikas.

Ne estos facila rolo, sed ni havas la rajton esperi, ke lia elektiĝo donos novan impeton al paco kaj unueco, kunlaborigado por tion atingi en la mondo, kaj ne malplej grave, konscio ke neinsisto pri prioritata uzo de la angla lingvo internacie indikas fundamentan respekton al la popoloj de la mondo kaj la egaleco de iliaj lingvoj kaj kulturoj.

Duncan Charters

## Informstando en Germanio




Finiĝis la Germana Eklezia Foiro (*Kirchentag*) en Hanovro - kun teamo ĉe informstando, al kiu direktiĝis centoj da novaj interesatoj pri nia lingvo. Ĉio finiĝis per komuna vespermanĝo kun dek kvin esperantistoj.

***Ulrich Matthias*** *kaj* ***Robert Weemeyer****.*

## Majaj memoroj

En majo ni festas okaze de la  datrevenoj de **André Cherpillod** (95 jaroj), **Aloyzas Gudavičius** (85 jaroj), **Trevor Steele** (85 jaroj). Ni gratulas kaj bondeziras! La maja listo, kompilita de Aleksander Korĵenkov, enhavas ankaŭ jubileojn kaj memordatojn de forpasintaj eminentaj esperantistoj: **Montagu Butler, Emilija Lapenna, Zlatko Tišljar** kaj aliaj.Legu la liston en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/05/majo-11/

## Karlo Pov ne plu kongresas kun ni

Mia edzo Karlo (la usonano *Charles Power*) lasis nin la 2-an de aprilo post longa malsano kaj suferado! Li volis donaci la korpon por medicinaj esploroj, pro tio katolika diservo okazos la 16-an de majo (li ne partoprenis organizitan religion, sed mi pensas, ke tio taŭgas).

Li multe amis kaj alte taksis vin, kaj estis KKS dum via prezidanteco (al Duncan Charters). Mi petas vin ĉiu: ĉu vi povus skribi kelkajn vortojn, mallonge, por la okazo? Pri liaj libroj - mi estas tute elĉerpita momente, sed ili trovos bonan lokon. Mi vizitis *Library of Congress*, iu arĥivisto povus helpi. Mi ŝatus mondonaci je lia nomo por iu celo en la movado kaj Usona kaj de UEA, fari laŭeble apartan konton au stipendion ktp. Detalojn ni povus pridiskuti kun Amanda, Chuck aŭ Grant Goodall.

Daniela Power

***SMG***:: Mi estas korrompita ekscii pri la forpaso de mia kolego kaj amiko Karlo Pov. Ni laboris kune en la CO en Roterdamo. Post la laborhoroj li regalis nin per multaj ludoj, kiuj refreŝigis nin post la tagaj laboroj. Pli dolorige estas scii, ke li suferis en siaj lastaj monatoj. Mi riverencas antaŭ lia memoro.

## Trevor Steele ĝuas sian 85-jaran jubileon



Okazis virtuala omaĝfesto honore al **Trevor Steele**, okaze de lia 85-jariĝa jubileo. La programo inkluzivis prelegeton de Trevor, eblon por ĉeestantoj prezenti gratulojn kaj dankojn al li kaj tempon por komentoj kaj demandoj pri liaj verkoj, kursoj kaj aliaj kontribuoj al Esperantujo

## Postskribe pri la Movada Foiro en Brno

Se via asocio deziras partopreni, aŭ se vi volas montri iun interesan iniciaton aŭ agadon, bonvolu skribi **antaŭ la fino de majo** al anna.lowenstein@esperanto.org.




## Brazilaj ritmoj

Ĉiu-monate okazas la **Brazila Muzikumado**, perreta kunveno por aŭdi, ludi, babili pri brazila muziko en Esperanto, en agrabla amika etoso. La venonta okazos sabaton, la 10-an de majo, je la 9-a horo antaŭtagmeze (laŭ UTC -3). La eniro estas libera. Sufiĉas en la ĝusta horo klaki sur tiu ligilo: brazilamuziko.com/muzikumado

## IKEF planas ambicie ĉirkaŭ UK

Certe IKEF volas bonvenigi ĉiujn IKEF-anojn kune karavani al la 110-a UK kaj post la UK kune vojaĝi al Prago, Berlino, Varsovio, Bjalistoko... Nia IKEF-Karavano estos ju pli internacia des pli sukcesa. Mi proponas al ĉiuj IKEF-anoj, kiuj partoprenos la 110-an UK en Brno, Ĉina grupo de IKEF flugos la 23-an de julio de Pekino al Vieno.

Prezidanto de IKEF, Ĉielismo WANG Tianyi, chielismo@qq.com; http://ikef.info

## Ondo atingas la kvarmilon

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis la artikolo 'Esperantaj jubileoj kaj memordatoj en majo 2025' de Aleksander Korĵenkov. Ĝi estas la **4000-a** artikolo publikigita en ĉi tiu novaĵretejo ekde ĝia fondo en septembro 2010.
Legu pli pri la retejo kaj konatiĝu kun la listo de la plej legataj artikoloj
https://sezonoj.ru/2025/05/ondo-141/

## La 60-a kunpensigado pri Esperanto en universitatoj

Bak Giwan parolis pri la historio de la Esperanto-fako de la Zaozhuang-a Universitato. Multaj demandoj sekvis. Antonio Leoni parolis pri Carlos Gagini, eminenta verkisto, lingvisto kaj esperantisto el Kostariko. Li prelegos pri li dum la 12-a Irana Kongreso kaj MONA. La junia kunpensigado ekos 30 minutojn pli malfrue ol kutime. Arko parolos pri aliaj ĉinaj universitatoj kaj Ilona Koutny pri sia plano restarigi aliloke bakalaŭran kurson de Esperantologio kaj Interlingvistiko laŭ la modelo de Poznano.

**Alessandra Madella**

Registraĵo en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/watch?v=CqxEJYoS-sc

## Hispanoj honoris pioniran virinon

Dimanĉe finiĝis la 83-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazis en la kastilia urbo Sorio (Soria) komence de majo, kun kelkaj aktivaĵoj por la loka loĝantaro antaŭe kaj kun turisma postkongreso la 5-an. Aliĝis iom pli ol 150 homoj. Vi povas legi unuan ĝerman raporton pri ĝi en la vikipedia paĝo
https://eo.wikipedia.org/wiki/83a_Hispana_Kongreso_de_Esperanto

Dum la kongreso oni aprobis la nomumon de María Rafaela Urueña kiel Honora Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kaj la kongreso finiĝis per ceremonio omaĝe al ŝi. Fotojn de tiu ĉi vi povas vidi tie ĉi:
https://www.facebook.com/share/19CR3gRWEx/

Aliaj fotoj aperas en la fejsbuka paĝo de HEF, https://www.facebook.com/esperanto.es,. La venonta kongreso okazos en julio 2026 en Portugalete, proksima al Bilbao (Biskajo).

## La 23-a  Internacia Medicina Eo-Kongreso

Hejmpag'o https://lsmu.lt/23-a-internacia-medicinista-esperanto-kongreso/
Aliĝilo https://forms.office.com/e/eNEugmiVRx

## Bulteno de UN 76 alkroĉita

- Internacia Virina Tago: La Prezidanto de Burundo honoris la esperantistinon Anny Joanice Nizigiyimana.
- Universala Esperanto-Asocio funebris la forpason de la Papo Francisko.
- Lingvaj rajtoj – en kaj preter Unuiĝintaj Nacioj.

## La Konga Stelo brilas

Mi dankesprimas al ĉiuj, kiuj ĝis nun subtenas la pluvivigon de *Konga Stelo* per sendado de artikoloj; ĉiujn 4 numerojn eblas trovi en la retejo:

https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo. Mi profitas inviti vin eksendi al ni jam nun viajn artikolojn por la 5-a numero, finpretigota junifine. Viaj artikoloj temu ĉefe pri via Eo-agado, viaregiona instruado de Esperanto, seminario, renkontiĝo kaj kulturo  Mi ataŭdankas vin pro via kontribuo!

Joel Muhire, Redaktoro de Konga Stelo (KS) kaj sekciestro de ILEI en Kongo DR

## Familia tago festata

Post deko da tagoj okazos la Tago de Familioj, festata ĉiujare de Unuiĝintaj Nacioj. Jen la mesaĝo de UEA je tiu okazo.  Bonvolu cirkuligi tiun tekston, utiligante viajn kontaktojn. La teksto, kiun pretigis Rafael Lima kaj francigis Gilles Tabard, estas nur unu el pluraj mesaĝoj, kiujn ni publikigas dum la jaro. Uzu ilin por disvastigi la mondan engaĝiĝon de UEA en pozitiva laboro por paco kaj kunlaboro. Tiuj dokumentoj estas troveblaj en nia retejo esperantoporun.org.

## Greziljona invito

**Catherine Kremer** kaj Jannick Huet atendas vin la 9-an de junio por viziti kun **profesia** ĉiĉeronado la vizitindaĵojn de Anĵuo kaj Turlando. Vi tranoktos kaj vespermanĝos en la franca esperantista kastelo Greziljono, kiu situas je 130 km de Nantes kaj 280 km de Parizo.



========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dek tri numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.  //RM ene majo 9 ED majo 12